


La 3an de julio 2016

Nuna Vivo de fukiŝima-anoj

Mapo ĉirkaŭ la nukleaj centraloj



La registaro trudas al la rifuĝintoj revenon al sia hejmo

Ĝis la 8a de februaro, rifuĝinte loĝas en la gubernio Fukuŝima 65463 fukuŝima-anoj kaj en aliaj gubernioj aliaj 43270 for de sia hejmo. Dum la pasintaj 5 jaroj rilatantaj mortintoj nombris 2016, pli multe ol 1604 mortoj pro la cunamo.

*Rilatantaj mortoj: mortoj pro malbona prizorgado, manko de medicino, malbona vivkondiĉaro, sinmortigo pro malespero ktp. En Fukuŝima rilatantaj mortoj estas pli multaj ol en aliaj du damaĝitaj gubernioj pro la nuklea akcidento, kvankam la rektaj mortoj estas malpli multaj.

	Mortoj	Malaperoj	Rilatantaj mortoj	Sinmortigo en 2015
Fukuŝima	1613	197	2016	23
Iŭate	4673	1124	455	3
Mijagi	9541	1236	918	1

La registaro kaj la gubernio Fukuŝima purigis la teron. Dank' al la purigado kaj nature malpliiganta radioaktiveco, ĉirkaŭ 90% de la instalitaj dozmetroj ne estas pli poluita ol la maksimuma normo de 0,23 mikrosiverto. Surbaze de tiu fakto la registaro revenigas la eksajn loĝantojn al ilia hejmo. En la lasta septembro ĝi deklaris, ke la urbo Naraha fariĝis “loĝebla” kaj poste, en junio 2016, la urbo Kacurao fariĝis “loĝebla”. Kaj ĝis la fino de marto 2017 ĉiuj urboj en la “Ne loĝeblaj zonoj” fariĝos “loĝeblaj”, kaj 46000 el la 70000 rifuĝintoj povos reveni al sia eksa hejmo. Pretekste, ke tiuj urboj estas/os “loĝeblaj”, la registaro intencas ne plu doni kompensan monon al la rifuĝintoj, kaj la gubernio Fukuŝima ĉesos doni senpagan loĝejon al “memvolaj” rifuĝintoj.

* “Memvolaj” rifuĝintoj: Rifuĝintoj el la urboj aprobitaj danĝeraj de la registaro estas devigitaj rifuĝintoj. “Memvolaj” rifuĝintoj estas tiuj, kiuj loĝas ekster tiuj urboj sed sentis danĝeron kaj rifuĝis el sia hejmurbo laŭ sia propra decido.

Reveni aŭ ne reveni? Ambaŭ estas infere

La urbo Naraha estis aprobita “loĝebla” en la lasta septembro, sed nur 460 (6%) el 8000 loĝantoj revenis al sia hejmo. 70% el la revenintoj estas maljunuloj pli ol 60-jaraj. Junaj generacioj kun infanoj ne volas reveni, timante malbonan influon de radioaktiveco al siaj infanoj. Krome multe da ili jam havas novan laboron kaj la infanoj al kutimiĝis al la nova lernejo kaj ne plu volas transferiĝi. La urbo celas, ke 50% de la eksaj loĝantoj revenu en la venonta jaro, surbaze de la rezulto de la enketo, ke 50% volas reveni.



Senhoma strato antaŭ la stacidomo Tomioka en Naraha (oktobro 2015)

Iu revenintoj jene plendas: “Antaŭ la katastrofo mi povis vivi per mia malmulta pensio, ĉar mi mem kulturis kampon kaj produktis rizon kaj legomojn, sed pro la radioaktiveco mi ne plu povas rikolti ilin kaj devas aĉeti ĉion. Sen subvencio mi ne povas vivi”. En tiuj urboj multaj domoj jam estas putrintaj kaj neloĝeblaj. Mankas hospitaloj kaj vendejoj, kaj plej grave mankas najbaroj. En tiaj kondiĉoj multaj ne povas reveni. Eĉ se ili povas, la vivo tie tute ne estas kontentiga.

Loĝi en provizora domo en fremda loko estas infere. Iu eksa instruisto el Namie mortis en julio 2014. Li translokiĝis en Tokio, kaj tuj poste li malsaniĝis. Li ripete diris: “Mi ne plu havas vivcelon. Senutile estas vivi”, kaj fariĝis demenca kaj mortis en la aĝo de 70 jaroj. Kuracistoj diras, ke manko de korpa ekzercado, multiĝo de streĉo, maltrankvilo, malespero, perdo de vivcelo, tiuj malbonigas korpan kaj koran staton.

Vivado en Fukuŝima estas serioza. La ĵurnalo Asahi enketis inter 1000 homoj kaj ricevis 619 respondojn. Jen respondoj pri la laboro kompare kun tiu antaŭ la Katastrofo kaj en aliaj damaĝitaj gubernioj:

	Fukuŝima	Iŭate	Mijagi
Sama laboro	29%	60%	48%
Senlaboro	25%	8%	7%
Malmulta aŭ sen salajro	67%	57%	61%

Pli serioza kaj mizera estas vivo de junaj patrinoj kun infanoj, kiuj translokiĝis en aliajn guberniojn. Ili ne nur alfrontas al financa malfacilo, sed ankaŭ al rompiĝo de la familio. Ne malmultaj eksedziniĝis, malsaniĝis, do ankaŭ iliaj infanoj suferas. Pri tiuj aferoj mi skribos aparte.

Jam 5 jaroj pasis, kaj dume okazis en Japanio kaj en la mondo diversaj katastrofoj, do homoj pli kaj pli forgesas la Japanan Katastrofon. En Fukuŝima tiu nuklea akcidento tute ne solviĝis kaj ĉiun tagon nove ekestas 500 tunoj da poluita akvo, Oni tute ne sukcesis elpreni fandiĝintajn nukleajn brulaĵojn. Ankoraŭ multegaj homoj rifuĝis kaj maltrankvile vivas, sed kiel malvarmkora estas la registaro! Ĝi ŝajnigas, ke la problemo estas jam solvita kaj ĉio estas bonorda, sed tute ne! Japanio ne estu en optimisma etoso!